Январь 1905. №№ 1—2. Januaro 1905.

# ESPERANTO.

Журналъ для распространенія международнаго языка въ Россіи.

С.-Петербургъ Ред. д-ръ И. ОСТРОВСКІЙ.

## ОГЛАВЛЕНІЕ.

Съ полной надеждой....
Д-ра И. Островскаго.

Съ радостью привѣтствую....
Д-ра Л. Заменгофа.

Значеніе журналовъ на родномъ и международномъ языкахъ.
Л. де-Бофрона.

Къ Эсперантистамъ.
А. Кофмана.

Труденъ-ли языкъ Эсперанто?
Д-ра И. Островскаго.

Маленькое письмо стараго эсперантиста.
И. Пучковскаго.

Конгрессъ Эсперантистовъ въ 1905 г.

Изъ Конгресса Философовъ въ Женевѣ въ 1904 г.
Д-ра А. Гринфельда.

Библіографія.
Д-ра И. Островскаго.

Журналъ „Международное Научное Обозрѣніе" (на языкѣ Эсперанто).
Д-ра А. Гринфельда.

Хроника.

Нѣсколько словъ къ нашимъ единомышленникамъ и читателямъ.
Д-ра И. Островскаго.

Перечень всѣхъ журналовъ и газетъ на яз. Эсперанто.
Е. Радванъ-Рыпинскаго.

Почтовый ящикъ.

Грамматика яз. Эсперанто.

Объявленія.

Ĵurnalo por propagando de lingvo internacia en Ruslando.

Peterburgo. Redaktoro D-ro I. OSTROVSKI.

## ENHAVO.

Kun plena espero....
D-ro I. Ostrovski.

Kun ĝojo mi salutas....
D-ro L. Zamenhof.

Graveco de la ĵurnaloj naciaj-Esperantaj.
L. de-Beaufront.

Al la esperantistaro.
A. Kofman.

Ĉu la lingvo Esperanto estas malfacila?
D-ro I. Ostrovski.

Malgranda letero de malnova Esperantisto.
I. Puĉkovski.

Kongreso esperantista en 1905 jaro.

El Kongreso de Filozofiistoj en Ĝeneve'o en 1904 jaro.
D-ro A. Grinfeld.

Bibliografio.
D-ro I. Ostrovski.

La ĵurnalo „Internacia Scienca Revuo" (en lingvo Esperanto).
D-ro A. Grinfeld.

Kroniko.

Kelkaj necesaj vortoj al niaj samideanoj kaj legantoj.
D-ro I. Ostrovski.

Nomaro de ĉiuj ĵurnaloj kaj gazetoj en lingvo Esperanto.
E. Radvan-Ripinski.

Poŝta kesto.

Gramatiko de la lingvo Esperanto.

Anoncoj.

128

# ESPERANTISTA GAZETARO

de ĝia naskiĝo ĝis nuna tempo.

## Газеты и Журналы на языкѣ Эсперанто.

En Esperanto.

1. Esperanto, 1889-1891, monata; Nurenbergo (German.) Ĉes.
2. Espero Katolika, 1903, mon,; Tur. (Franc.) 72 rue de Halles Red. Prof. Em. Peltier jarabono 2 fr. 50 c.
3. Internacia Scienca Revuo, 1904, mon. Red. D-ro P. Fruictier, Parizo (Franc) B-d st Cermain—7 fr.
4. La Juna Esperantisto, 1903, dumon, Ĝenevo (Svis.) Avenue de Vollandes,—2 fr.
5. La Tutmonda Revuo, 1905, mon. Londono W. C. (Angl. 71 High Holborn.)
6. La Stenografiisto, 1904. — Amsterdam (Hol.) Ĉes.
7. Lingvo Internacia, 1895, dusem, Parizo (Franc) 33, rue de Lacépèd Red. D-ro P. Fruictier, 4 fr.
8. Literatura Biblioteko de L. I. 1903, dusem. La sama adreso, Red. D-ra P. Fruictier—2 fr 50 c.
9. Revuo Internacia de stenografio, 1904, Hilversum (Hol) 74, Tulpstraat,—3 fr.
10. Revuo Internacia, 1902-1903, Bystrice Hostyn (Aŭstr) Ĝes.
11. Revuo Universala,, 1904, dumon. Havro (Franc) Ĝes.
12. Trumpetisto, 1904, Tirnovo (Bulgur) Ĉes.

---

## Nacia-Esperantaj.

1. Antauen Esperantistoj! 1903, mon. Red. Ant. Alvardo Lima (Per ru Suda Ameriko.) 105, str. Lartiga,—3 fr.
2. Bohema Esperantisto 1902, mon. Bystrice Hostun (Austr) ĉes.
3. Ĉesky Esperantista 1904, mon. La sama adreso Red. Ĉejka Th, 3 fr. 50 c.
4. Ĉilio Esperantista, 1904, mon. Santjago Ĉilio. Suda Ameriko. Cas. 1989, Sepulveda Cuadra—1 fr. 50. c.
5. Esperantaj Sciigoj, 1904, mon. Berlino (Germ) ĉes.
6. Esperanto, 1902,—Santander. (Hispan) ĉes.
7. Esperanto. 1905, St. Peterburgo Dusemajna 8 fr. Red. I. Ostrovski en Jalta,
8. Esperantiste Canadien, 1901, mon. Montreal (Kanado Norda Ameriko) Ĉes.
9. Germana Esperantisto, 1902, mon. Bystrice Hostyn (Aŭstr) ĉes.
10. Germana Esperantisto, 1905, mon. Red. I. Borel. Berlino (Germ) 95, Prinzenstasse,—4 fr.—
11. La Belga Sonorilo, 1902, mon. Bruselo (Belg) 31 ,rue de Patriotes Red. Jos. Jamin.—3 fr.
12. La Holanda Pioniro, 1903, trimon. Red. Dreves Uitterdijk. Hilversum (Hol),—3 frankoj.
13. La Lumo. 1902, Montreal (Kanado' Norda Ameriko) ĉes.
14. La Meksika Lumturo, 1904, mon. Red D-ro Vargas. Santa Rosa Necoxtva (Meks. Ameriko.)—3 fr.
15. La Suno Hispana, 1903, mon. Red. Jimenes Loira. Valencia (Hispan) 3, Carniceros—3 fr.
16. La Svisa Espero, 1903, mon. Th. Renard. Ĝenevo (Svis.) 6, rue de Vieux Collège,—2 fr. 50.
17. L'Esperantista, 1903, mon. Red. Grafo Alb. Gallois. Rionulato (Ital)—4 fr.
18. L,Esperantiste, 1898, mon., Red. L. de Beaufront. Louviers (Franc)—3 fr. 50 c.
19. Monata Revuo Esperantista, 1903, Södertelge (Sved) Ĉes.
20. Rondiranto, 1902, mon. Red. G. Oreŝkov. Plovdiv (Bulgar)—4 fr.
21. The British Esperantist. 1905, Londono (Angl) 14 Norfolk Street, Strand.
22. The Esperantist, 1903, mon. Red. H. Bolingbruke Mudie. Londono W. (Angl) 41, Outer Temple,—4 fr.
23. Munĥena Esperantisto, 1903, Munĥeno Germ. ĉes.
24. Kalejdoskopo de la Esperantistoj, Askersund. Sved. (ces).
25. Mondlingvisto, 1889. mon. Sofio Bulgara-esperanta Redaktoro D-ro Diodono. Ĉes.
26. „Unua Paŝo". —1905. Sofio (Bulg.)
27. „La Alĝera Stelo". Duonmonata. 1905. Alĝero (Afriko)—2 fr. Eksterlanden—3 fr.
28. Esperanta ligilo 1904, dumon. pres. laŭ Braille por blinduloj, Parizo (Franc) 12 rue Soufflot 3 fr. Red. Th. Cart.

Январь 1905. №№ 1-2. Januaro 1905.

# Esperanto.

Журналъ для распространенія международнаго языка эсперанто въ Россіи.

Jurnalo por propagando de lingvo internacia Esperanto en Ruslando.

Съ полной надеждой мы начинаемъ нашу серьезную и трудную задачу—пропаганду идеи о вспомогательномъ международномъ языкѣ и главнымъ образомъ пропаганду искусственнаго международнаго языка Эсперанто, составленнаго нашимъ соотечественникомъ докторомъ Л. Заменгофомъ.

Мы достаточно знакомы съ этимъ вопросомъ и потому позволяемъ себѣ во всеуслышаніе выразить наше глубокое убѣжденіе, что всякій, кто безъ предвзятаго мнѣнія пожелаетъ насъ выслушать, тотъ скоро самъ вступитъ въ ряды нашихъ соратниковъ.

У насъ имѣются многочисленныя доказательства практическаго примѣненія языка Эсперанто въ наукѣ, литературѣ, торговлѣ и проч. и самые упорные скептики могутъ убѣдиться, что мы не говоримъ о чемъ то фантастическомъ, что теперь уже не можетъ быть рѣчи о томъ, возможенъ ли искусственный языкъ, ибо это уже есть существующій фактъ, потому что:

*a)* Десятки тысячъ людей уже владѣютъ такимъ языкомъ и обитатели всѣхъ пяти странъ свѣта уже обмѣнивались и все чаще и чаще обмѣниваются между собой многими сотнями тысячъ писемъ на языкѣ Эсперанто.

*в)* Всѣ цивилизованные народы міра имѣютъ уже свои періодическія изданія на этомъ языкѣ.

*c)* Въ многочисленныхъ большихъ городахъ всѣхъ пяти частей свѣта уже существуютъ

Kun plena espero ni komencas nian seriozan kaj malfacilan taskon—la propagandon de la ideo de helpa internacia lingvo kaj ĝenerale la propagandon de artefarita internacia lingvo Esperanto, kreita de nia sampatrujano doktoro L. Zamenhof.

Ni sufiĉe konas tiun ĉi demandon kaj tial permesas al ni laŭtvoĉe esprimi nian profundan konvinkon, ke ĉiu, kiu sen antaŭjuĝa opinio volos eknŭdi nin, tiu baldaŭ mem eniros en la vicojn de niaj kunbatalantoj.

Ni posedas multenombrajn pruvojn de praktika uzado de lingvo Esperanto por scienco, literaturo, komerco kaj cetera, kaj plej obstinaj skeptikuloj povas konvinkiĝi, ke ni ne parolas pri io fantazia, ke nun oni ne povas jam konsideradi pri tio, ĉu artefarita lingvo estas ebla, ĉar, tio ĉi estas jam ekzistanta fakto:

Ĉar dekoj miloj da homoj jam posedas tian lingvon kaj anoj de ĉiuj kvin terpartoj de l' mondo jam interŝanĝadis kaj ĉiam pli kaj pli interŝanĝadas per multaj centoj miloj da leteroj en ia lingvo Esperanto;

Ĉar ĉiuj civilizitaj popoloj jam posedas siajn periodajn eldonojn en tiu-ĉi lingvo;

Ĉar en multenombraj grandaj urboj en ĉiuj kvin terpartoj de l'mondo jam ekzistas

Библиотека Академии Наук СССР

многія Общества Эсперантистовъ, читаютъ публичныя рѣчи, устраиваютъ курсы и. т. д.

*d)* На этомъ языкѣ выходитъ въ Парижѣ чисто научный журналъ "Internacia Scienca Revuo„ ("Международное Научное Обозрѣніе„), на страницахъ котораго можно прочесть новости науки вчерашняго дня, и въ которомъ принимаютъ участіе такіе извѣстные ученые, какъ: d' Arsonval, Berthelot, Förster, Poincaré, Ramsay, извѣстный русскій филологъ профессоръ языковѣденія Петербургскаго университета Бодуэнъ де-Куртенэ и другіе.

*e)* Наконецъ, потому что были уже многочисленные случаи устнаго употребленія Эсперанто между отдѣльными лицами и между группами лицъ разныхъ національностей, не владѣвшими какимъ либо общимъ живымъ языкомъ, которые, однако, легко и свободно разговаривали на искусственномъ языкѣ Эсперанто и, лишь благодаря ему одному, они могли завязать между собой духовныя, научныя, торговыя или другія сношенія.

Польза отъ введенія одного общаго, понятнаго для всѣхъ народовъ, языка столь громадна, что люди не могутъ себѣ представить, что они могутъ достигнуть такого блага, затративъ всего 30 — 40 часовъ на изученіе Эсперанто.

Препятствія для духовныхъ, научныхъ, торговыхъ и другихъ сношеній между людьми, говорящими на разныхъ языкахъ, слишкомъ огромны, чтобы люди могли скоро повѣрить, что всѣ эти препятствія такъ легко устранимы при помощи искусственнаго языка.

Люди знаютъ, что всѣ существующіе живые языки очень сложны и слишкомъ трудны для изученія и потому имъ кажется невѣроятнымъ, чтобы для языка не менѣе богатаго и гибкаго, чѣмъ живые языки, было бы достаточно всего только 16 грамматическихъ окончаній и нѣсколько простыхъ правилъ безъ всякихъ исключеній.

Мы поэтому сознаемъ, что предпринятая нами задача пропаганды международнаго языка Эсперанто не легка, но вся трудность ея заключается не въ томъ, чтобы доказать, что идея введенія искусственнаго международнаго языка не есть утопія и что введеніе такого языка во всеобщее употребленіе возможно и желательно, ибо и то,

multaj societoj esperantaj, publjkaj paroladoj, aranĝitaj kursoj kaj cetera

Ĉar en tiu-ĉi lingvo eliras en Parizo vere scienca ĵurnalo „Intarnacia Scienca Revuo", sur kies paĝoj oni povas tralegi novaĵojn de hieraŭa tago, kaj kiun partoprenadas tiel eminentaj scienculoj, kiel ekzemple: D'Arsonval, Berthelot, Förster, Poincaré, Ramsay, distinga rusa filologisto profesoro de lingvoscienco en Peterburga universitato Baudouin de Courtenay kaj aliaj;

Ĉar, fine, jam estis multenombraj faktoj de buŝa uzado de Esperanto inter aparataj personoj kaj inter grupoj da personoj de diversaj nacioj, kiuj ne posedis ian komunan vivan lingvon, kiuj tamen facile kaj libere interparoladis en artefarita lingvo Esperanto kaj, nur dank'al ĝi sola, ili povis interligadi spiritajn, sciencajn, komercajn aŭ aliajn rilatojn.

La utilo de enkonduko de unu komuna, komprenebla por ĉiuj popoloj, lingvo estas tiom grandega, ke homoj ne povas prezenti al si, ke ili povas atingi tian bonon, uzinte nur 30-40 da horoj por ellerni Esperanton.

La malhelpoj por spiritaj, sciencaj, komercaj kaj aliaj rilatoj inter la homoj, parolantaj malegalajn lingvojn, estas tro grandegaj, por ke homoj povu baldaŭ kredi, ke ĉiuj tiuj ĉi malhelpoj estas tiom facile forigeblaj per helpo de artefarita lingvo.

La homoj scias, ke ĉiuj ekzistantaj vivaj lingvoj estas tro malsimplaj kaj tro malfacilaj por ellernado kaj tial al ili ŝajnas nekredebla, ke por lingvo, kiu estas ne malpli riĉa kaj fleksebla, ol vivaj lingvoj, estus sufiĉe nur dekses gramatikaj finiĝoj kai kelkaj simplaj reguloj sen iaj esceptoj.

Tial ni konscias, ke entreprenita de ni tasko— propagando de internacia lingvo Esperanto ne estas facila, sed la tuta malfacileco ĝia estas ne en tio, ke ni pruvu, ke la ideo de enkonduko de artefarita internacia lingvo ne estas utopio kaj ke la enkonduko de tia lingvo por komuna uzado estas ebla kaj dezirinda, ĉar tio kaj alia jam estas konsciita kaj akceptita

и другое уже признано и принято многими тысячами людей, среди которыхъ находятся имена такихъ великихъ мыслителей, какъ Бэконъ, Паскаль, Лейбницъ, Декартъ, Л. Н. Толстой, имена извѣстнѣйшихъ ученыхъ, членовъ академій наукъ и профессоровъ университетовъ: Bouchard, Tard, Ch. Richet, Ducklaux, Roux, Lambert, D'Arsonval, Sebert, Charles Meray E. Naville, C. Bourlet, Discailles, O. Vogt, Boirac, W. Ostwald, Callmete, G. Moch, Stead, Lamansky, Baudouin de Countenay, L. Zarnowiecki и др., также мировые корифеи филологіи: Grimm, Max Müller, Hugo Schuchardt, Henry Philipps и другіе. Наконецъ, тычяча именъ не названныхъ здѣсь членовъ академій наукъ, профессоровъ университетовъ всѣхъ странъ и огромное число литераторовъ, журналистовъ, преподавателей, докторовъ, адвокатовъ, инженеровъ, художниковъ, священниковъ, офицеровъ, промышленниковъ и многихъ другихъ лицъ разныхъ профессій и сословій служатъ самымъ авторитетнымъ опроверженіемъ всѣхъ апріористическихъ разсужденій скептиковъ, не дающихъ себѣ труда хоть нѣсколько ознакомиться съ тѣмъ вопросомъ, противъ чего они часто такъ голословно 'спорятъ.

Поэтому главная трудность нашей задачи въ томъ, какъ привлечь вниманіе людей къ этой идеѣ? Наша забота —какъ побудить людей отнестись къ ней со всей серьезностью, которую она безспорно заслуживаетъ? Тогда люди воочію убѣдятся, что идея эта уже вышла изъ стадіи дебатовъ и размышленій, что она уже осуществляется; и тогда, судя уже на основаніи многочисленныхъ фактовъ, каждый легко пойметъ, какое сокровище мы имѣемъ въмеждународномъ языкѣ Эсперанто. .

Въ настоящей нашей первой статьѣ мы считаемъ необходимымъ выяснить, что мы ратуемъ за введеніе во воеобщее употребленіе искусственнаго языка Эсперанто, который, нисколько не посягая на существованіе живыхъ языковъ, долженъ служить лишь вторымъ, вспомогательнымъ и общимъ для всѣхъ народовъ языкомъ для облегченія международныхъ сношеній, но отнюдь не, какъ многіе ошибочно ду-

de multaj miloj da homoj, inter kiuj sin trovas la nomoj de tiel grandaj pensantoj kiel: Bacon, Pascal, Leibnitz, Descartes, L. Tolstoj; la nomoj de plej eminentaj scienculoj, membroj de akademioj, profesoroj de universitatoj: Bouchard, Tard, Ch. Richet, Duclaux, Roux, Lambert, D'Arsonval, Sebert, Charles Meray, E. Maville, C. Bourlet, Calmette, Boirac, Discailles, Stead, O. Vogt, W. Ostwald, G. Moch, Lamansky, Baudouin de Courtenay, Zarnowiecky kaj aliaj, ankaŭ mondfamaj korifeoj de filologio: Grimm, Max Müller, Henry Philipps, Hugo Schuchardt kaj multaj aliaj.

Fine milo da tie ĉi ne cititaj nomoj de akademianoj, universitataj profesoroj de ĉiuj landoj kaj grandega nombro da literaturistoj, ĵurnalistoj, doktoroj, instruistoj, advokatoj, inĝenieroj, pastroj, oficiroj, artistoj, industriistoj kaj multaj aliaj personoj de diversaj profesioj kaj klasoj servas kiel plej aŭtoritata neigado de ĉiuj aprioraj konsideradoj de skeptikuloj, ne farantaj al si laboron por almenaŭ iomete konatiĝi kun tiu demando, kiun ili ofte nur nudvorte kontraŭdisputas.

Tial la ĉefa malfacileco de nia tasko estas- kiamaniere altiri la atenton de homoj al tiu ĉi ideo? Nia zorgo—kiamaniere igi la homojn rilati sin al ĝi kun plena seriozeco, kiun ĝi sendube meritas? Tiam la homoj okulvideble konvinkiĝos, ke tiu ĉi ideo jam trapaŝis la tempon de debatoj kaj meditadoj, ke ĝi jam efektiviĝadas kaj tiam ĉiu, apogante sin jam sur multenombraj faktoj, facile komprenos kian trezoron ni havas en internacia lingvo Esperanto.

En tiu ĉi nia unua artikolo ni konsideras necese klarigi, ke ni batalas pro enkonduko por komuna uzado de artefaria lingvo Esperanto, kiu neniel atencas la ekzistadon de naturaj lingvoj, ĝi devas servadi nur kiel dua, helpa kaj komuna por ĉiuj popoloj lingvo por faciligi la internaciajn rilatojn, sed neniam, kiel iuj erare pensas, ke la partianoj de tiu-ĉi ideo celas forigi ĉiujn

маютъ, что сторонники этой идеи имѣютъ намѣреніе упразднить всѣ живые языки и замѣнить ихъ искусственнымъ, единнымъ для всѣхъ народовъ.

Кто станетъ отрицать, что взаимное непониманіе въ значительной степени служитъ частью и причиной взаимной вражды между народами? Всѣ народы, пользуясь однимъ общимъ языкомъ, могли бы понимать одинъ другого, и тогда человѣчество, быть можетъ, было бы настолько счастливо, что трактовало-бы о всѣхъ ужасахъ войны такъ, какъ мы теперь говоримъ объ ужасахъ инквизиціи, какъ о величайшемъ людскомъ злѣ и несчастіи, давно исчезнувшемъ съ лица земли. Если введеніе общаго международнаго языка можетъ хоть нѣсколько приблизить это счастливое время, не составляетъ-ли и поэтому содѣйствіе такой пропогандѣ одну изъ благороднѣйшихъ и возвышенныхъ задачъ?

Мы поэтому надѣемся на серьезное вниманіе и содѣйствіе нашей пропогандѣ со стороны прессы и приглашаемъ ее болѣе активно выразить свое благожелательное участіе въ самомъ началѣ практическаго осуществленія идеи, которой, по нашему глубокому убѣжденію, предстоитъ въ скоромъ времени блестящее будущее.

*Д-ръ И. Д. Островскій.*

Петербургъ.
Январь 1905 г.

naturajn lingvojn kaj anstataŭigi ilin per artefarita lingvo unu sola por ĉiuj popoloj.

Kiu volos neigi, ke reciproka malkompreniĝo je valora grado ofte kaŭzas reciprokan malamikecon inter la popoloj? Ĉiuj popoloj, uzante unu komunan lingvon, povus kompreni unu la alian, kaj tiam, eble, la homaro fariĝus tiel feliĉa, ke ĝi traktus pri ĉiuj teruroj de militado, kiel ni nun traktas pri la teruroj de inkvizicio, kiel pri la plej granda homara malbono kaj malfeliĉo, kiu jam delonge malaperis sur nia terglobo. Se la enkonduko de komuna internacia lingvo povas almenaŭ iom alproksimigi tiun ĉi feliĉan epokon, ĉu ne estas eĉ tial unu el plej noblaj kaj plej altspiritaj celoj la kunhelpo al tia propagando?

Tial ni esperas seriozan atenton kaj kunhelpon al nia propagando de la presaro kaj invitas ĝin pli aktive esprimi ĝian bondeziran partoprenon la la mem komenco de praktika efektiviĝo de de ideo, al kiu laŭ nia profunda konvinko sekvos baldaŭa brila estonteco.

Doktoro I. D. Ostrovski.

Peterburgo.
Januaro 1905.

---

Kun ĝojo mi salutas la unuan rusan gazeton dediĉitan al la afero de la lingvo internacia Esperanto. Tiu ĉi gazeto aperis malfrue, tre malfrue... Sed pli bone malfrue, ol neniam..

La lingvo Esperanto naskiĝis en Rusujo kaj la unuaj lernolibroj kaj vortaroj estis eldonitaj en la lingvo rusa; tial ne estas mireble, ke ankaŭ la unuaj amikoj de tiu ĉi lingvo estis rusujanoj. En la unua serio de la esperantistoj, eldonita en la jaro 1889, inter 100 adresoj oni apenaŭ trovis kelkajn dekojn da adresoj eksterlandaj,—ĉiuj aliaj estis el Rusujo.

Oni devis tial antaŭvidi, ke ankaŭ la unua esperanta gazeto aperos en Rusujo. Sed kvankam la aŭtoro de Esperanto komencis klopodi pri tio-ĉi jam en la jaro 1888, liaj penadoj ne havis sukceson. Pro diversaj kauzoj ne sole gazeto ne povis eliradi, sed ankaŭ la disvastigado mem de la lingvo Esperanto estis ligita sur ĉiu paŝo kun grandaj malfacilaĵoj. Kaj se malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj la afero de la lingvo ne pereis tuj en la komenco, tio venis nur de tio, ke la aŭtoro de la lingvo tiam estis ankoraŭ juna kaj havis ankoraŭ sufiĉe da energio, por ne perdi la kuraĝon kaj batali kontraŭ la malfacilaĵoj.

Tamen pli aŭ malpli frue tiu-ĉi energio

devis elĉerpiĝi. La materiala situacio de la aŭtoro jam de longe estis tre malbona kaj, kiam en la jaro 1895 al la sola esperanta gazeto (kiu eliradis en Nurenbergo) en una bela tago estis fermita la enirado Rusujon, kie ĝi havis pli ol duonon de siaj abonantoj, tiam ĉe la aŭtoro falis la manoj.

Sed feliĉe al tiu tempo la afero de la lingvo Esperanto jam sukcesis fortiĝi en la eksterlando. Jen tie, jen aliloke komencis aperadi varmegaj laborantoj, kaj iom post iom la tuta pezocentro de la espetanta afero transŝoviĝis eksterlanden (precipe Francujon). Kaj en Rusujo pro diversaj malfacilaĵoj la afero komencis ĉiam pli kaj pli fali.

Nun, kiam en la eksterlando eliras jam pli ol dudek esperantaj gazetoj, aperis fine ankaŭ la unua esperanta gazeto en Rusujo. Estas domaĝe, ke ĝi aperis tiel malfrue, sed-ni ripetas—pli bone malfrue ol neniam. Nun, kiam en la eksterlando la afero esperanta ĉiutage faras grandegajn paŝojn antaŭen, ni esperu, ke ĝi ankaŭ en Rusujo reviviĝos kaj la nunaj rusaj esperantistoj jam ne devos bataladi kun tiaj malfacilaĵoj, kun kiuj devis bataladi la unuaj pioniroj.

L. Zamenhof.

## GRAVECO DE LA ĴURNALOJ NACIAJ-ESPERANTAJ.

Ĝis nun la sperto montris, ke la progresoj de Esperanto estas, por tiel diri, sendisiĝe ligitaj en ĉiu lando kun la ekzisto de ĵurnalo nacia-Esperanta. Eldonu bonajn lernolibrojn, multigu la artikolojn aŭ paroladojn pri nia entrepreno, altiru al ĝi eminentajn homojn, varbu en via lando centojn eĉ milojn da adeptoj al Esperanto, fondu en ĝi propagandan Societon kaj, malgraŭ tio, vi konstatos, ke nia afero progresos nur paŝete en via patrujo, ĝis vi fondos por ĝi gazeton nacian-Esperantan.

Nenio povas anstataŭi la efikeccn de tiu ĉi necesega propagandilo, konvertilo kaj konservilo. Efektive, se gazeto komprenebla, kaj senpene komprenebla, ne venos almenaŭ ĉiumonate subteni kaj revarmigi la fervoron de viaj varbitoj, la flameco de ilia aliĝo estingiĝos tre baldaŭ. Aliparte ili bezonas kuraĝigojn, ekzemplojn, direkton en sia agado por nia afero. La gazeto nacia-Esperanta tion donos al ili. En sia propagando ili renkontas kontraŭdirantojn, kiujn ili devas respondi per seriozaj argumentoj, iom diferencaj laŭ la rasoj kaj landoj. Tiujn argumentojn al ili liveras la ĵurnalo nacia-Esperanta. Vere, kaj tion ni ne volas kaŝi, kelkaj amikoj pretendas, ke nun ni povas forlasi la rezonadon kaj batali por nia ideo nur per la faktoj. Sed, unue, kiu grupigos kaj prezentos pli taŭge, ol najn kaj decidigajn? Kiu pli bone ol ĝi, scios elekti, laŭ la speciala karaktero de l'popolo celita, la faktajn-armilojn kapablajn forpeli la dubojn el la spirito? Kaj ĉu vere niajprogresoj alportas per si mem konvinkon tiel fortan, ke la gazeto nacia-Esperanta, tiujn faktojn impola ĵurnalo nacia-Esperanta ne pul bezo-nus rezoni kaj argumenti? Tion mi ne kredas. „Jes, pensas kaj diras ankoraŭ multaj, jes, vi progresis; sed la ideo, al kiu vi servas, progresus senkompare pli mirige, se vi akceptus alian sistemon, la lingvon latinan, ekzemple“. Ĉu antaŭ tiaj certiguj la argumento de niaj progresoj povas efiki? Ĉu al kiu ne volus aliĝi al Esperanto, ĉar li havas malĝustajn ideojn pri la rolo, la naturo, la konstruo de la lingvo internacia, ĉu al tiu ni povos respondi certigante kaj eĉ pruvante, ke Esperanto servas al ni tute kontentige? Tiel longe, kiel ni ne montros al li klarege lian eraron per rezonado severe logika, tiel longe, kiel ni ne pruvos la ĝustecon de l'fundamento, sur kiu kuŝas Esperanto, tiu homo ne konvertiĝos al vi. Sed li ne estas escepto malofta; similaj al li ekzistas miloj, eĉ multe pli, en ĉiu lando. Nu, precize la ĵurnalo nacia-Esperanta havas la rolon ilin konverti al ni per argumentoj, kiel ĝi altiras la aliajn al Esperanto per elmontrado de faktoj.

Gazeto tute Esperanta povas servi nur por konvertitoj; ĝia enhavo neniel influas sur la aliajn. Koutraŭe, gazeto nacia-Esperanta servas por konvertotoj. Ĝi estas armilo

en la manoj de ĉiuj propagandistoj, kiuj ĉiumomente povas uzi ĝin por konigi Esperanton al parenco, amiko, konato kaj ilin altiri al ĝi ĉu per faktoj, ĉu per argumentoj. Tuj kiam iu aliĝas al nia ideo, la gazeto nacia-Esperanta fariĝas rimedo por certigi la fidelecon de la varbito. Dum li povus rifuzi gazeton pure Esperantan, sub la preteksto, ke li ankoraŭ ne sufiĉe scias la lingvon, li ne povas rifuzi gazeton nacian-Esperantan, kiu helpos al li en la akiro de la lingvo per specialaj klarigoj kaj kompareblaj tekstoj. Fine tiu gazeto povas alligi al ni ĉiun, kiu akceptas nian ideon, eĉ se pro sia aĝo, farto aŭ okupado, li ne lernos Esperanton; tre ofte ĝi ŝanĝos en adepton la simplan aprobanton, instigante lin al la lerno de la lingvo, dank'al la facila komparo de Esperanto kun la livgvo nacia.

Pro tiuj motivoj kaj aliaj, kiujn bedaŭrinde mi ne povas malvolvi pro manko de tempo, mi ĉiam vidis kun grandega ĝojo la fondon de ĵurnalo nacia-Esperanta. Sed ankoraŭ neniam mi sentis tiel fortan plezuron antaŭ tia fondo ol hodiaŭ, kiam mi salutas la naskiĝon de „Esperanto„ en la lando mem, kiu dank'al D-ro Zamenhof donis al la mondo la lingvon, kies nomon portas la juna gazeto. Direktata de fondinto, kiu sin rimarkiĝis iam per nekredebla fervoro, ĝi tre certe puŝos fortege antaŭen nian aferon en tuta Rusujo.

L. de Beaufront.

Prezidanto de la S. F. P. E.

---

## AL LA ESPERANTISTARO.

Esperanta gazeto en Rusujo! Efektiva gazeto, presita en rusa tipografio, sur rusa papero! Ĝi sonas preskaŭ nekredebla, ĉar la semo gazeta ĝis nun obstine ne volis leviĝi sur la rusa tero daŭre 17 joroj. Du fojojn oni klopodis en Varsovio sen trovi ombron de l'dezirita rezultato. Du fojojn oni petis la permeson por tiu ĉi eldono en Odessa sen esti honorita de l' demandita respondo. Du fojojn oni faris iron por la sama celo en Peterburgo, kaj ĉiam la sama repuŝo! Anstataŭ sukceso ĉiam venis fiasko. La sorto de l'esperanta gazeto memorigas pri la komenca sorto de la lingvo Esperanto en la tuta mondo. Esperanto estis malestime nomata, „elpensaĵo", kvazaŭ la rezultato de nia tuta civilizacio ne estas ptodukto de l' penso. Esperanto estas „kondiĉaĵo", kvazaŭ ĉiunaciaj skribliteroj, aritmetikaj ciferoj, algebraj signoj, kemiaj formuloj, muzikaj notoj, niaj moroj, niaj societaj interrilatoj, niaj plej altaj idealoj ne estas kondiĉaj! La mokado, kiun Esperanto trovis daŭre siaj komencoj en la mondo, estis ankoraŭ pli kruda en Rusujo: por esti mokanto oni devas scii tiom malmulte!

Estas vere, ke en la komenco Rusujo havis pli da adeptoj de nia lingvo, ol la tuta okcidenta Eŭropo; sed oni povis diri a p r i o r e, ke Rusujo ne estis prosperejo por nia internaciilo. Simile al multaj aliaj aĵoj nia lingvo devis foriri por serĉi rifuĝejon sub alia ĉielo en alilandoj, kie la aero estas pli fruktiga, kie la vivo pulsadas pli energie, kie la tradicio pri la estintaĵo estas malpli ŝatata, kie la estontaj dioj jam estas naskiĝantaj. Kaj tiu rifuĝejo, en la plej bela senco de la vorto, estis precipe Francujo, tiu mirinda kaj admirinda lando, kiu daŭre centjaroj tiras kaj logas al si senlacige la okulojn de l'mondo. Tio ĉi estis sufiĉe! Unu fojon Francujo sankciis Esperanton, la aliaj nacioj bonvole aplaŭdis ĝin, kaj de tiam Esperanto komencis sian venkan marŝadon sur tuta Eŭropo. La esperantaj gazetoj multiĝis; la naciaj gazetoj malfermis siajn buŝojn. ĝis tiam mutajn koncerne Esperanto; la bruo leviĝis en Anglujo kaj Ameriko. Al ni, rusoj, fariĝis honte ne akcepti tion, kio estas akceptata de la civilizitaj popoloj—aperis esperanta gazeto en Rusujo!

La legantoj vidas, ke la gazeta afero en Rusujo ne estas afero nacia. Ne, ĝi estas vera internacia, ne sole pro la internacieco de la lingvo Esperanto, sed ankâu pro la komunaj fortoj de ĉiuj nacioj, kiuj starigis nian lingvon sur firmaj piedoj. La rusa—esperanta gazeto ŝuldas sian ekziston al Francujo, al Svedujo, al Hungarujo, al ĉiuj landoj, kiuj kulturis Esperantujon kaj en sia kuneco imponis la

rusajn potenculojn. Sen tiuj ĉi komunaj penoj de ĉiulandaj esperantistoj la malpermeso ne estus nur deksepjara. Tial mi vokas ĉiujn esperantistojn, rusajn kaj alilandajn por helpi al nia nova esperantido. Amu ĝin, kiel patrino amas sian infanon, naskitan en sufetoj. Honoru ĝin per viaj spiritoj, per viaj inklinoj. Ke ĉiu naciano bonvolu oferi al ĝi iom da sia patruja spiro, kaj nia „Esperanto" baldaŭ fariĝos efektiva internacia gazeto. Ni ne volas havi nacian gazeton en internacia lingvo! Nia „Esperanto" devas kaj povas rebrili la francan idealismon, la germanan sciencamon la anglan praktikecon, la italan entuziasmon k. c. k. c., ĉio kombinita en harmonia proporcio sub la alta devizo: „nenia homaĵo estas fremda al mi". Angloj, Belgoj, Ĉehoj, Danoj, Francoj kaj ĉiuj aliaj—via nombro estas granda—ne forgesu la rezultaton de via komuna laborego, ne forgesu „Esperanton", ne deturnu vian vizaĝon de ĝi. Partopreno literatura, partopreno abona, partopreno konsila—por tio estos granda danko al vi. Per nia „Esperanto" ni eniras en la grandan regnon „Esperantujo", kaj ni firme esperas, ke la „esperantujanoj" nin akceptos afable kaj kompleze, etendante al ni sian helpan manon.

A. Kofman.

---

## Труденъ-ли языкъ Эсперанто?

Въ 1892 году я очень скептически прочелъ въ какой-то газетѣ сообщенiе объ открытiи въ Петербургѣ Общества „Эсперо", утвержденнаго г. Министромъ Вн. Дѣлъ. Однако, я выписалъ отъ Эсперо учебникъ и былъ очень удивленъ, какъ легко я могъ изучить международный языкъ Эсперанто, какой онъ благозвучный, богатый, гибкiй и логически построенный. Я не владѣю никакими иностранными языками, только очень мало понимаю нѣмецкiй языкъ, но никогда не осмѣлился-бы писать или хотя-бы отвѣтить нѣсколько словъ по нѣмецки, хотя изучалъ его восемь лѣтъ, будучи гимназистомъ, а международный языкъ Эсперанто я скоро изучилъ втеченiи двухъ недѣль, затрачивая только 1—2 часа въ день. Вмѣстѣ со мной успѣшно изучила языкъ въ такое-же время и моя десятилѣтняя дочь и мы оба вступили въ переписку по эсперантски съ русскими и иностранными эсперантистами, чтобъ убѣдиться, поймутъ-ли насъ. Результаты были удивительные. Я съ намѣренiемъ выбиралъ изъ списка адресовъ всегда новыхъ корреспондентовъ французовъ, нѣмцевъ, англичанъ, итальянцевъ, шведовъ, норвежцевъ, португальцевъ и др. Всѣ они очень хорошо понимали мои письма

## ĜU LA LINGVO ESPERANTO ESTAS MALFACILA?

En 1892a jaro mi tre skeptike tralegis en ia gazeto la sciigon pri la malfermo de Societo „Espero" en Peterburgo, konfirmita de S-ro Ministro por Aferoj Internaj. Tamen mi venigis el „Espero" lernolibron esperantan kaj estis tre mirigita, kiel facile mi povis ellerni la internacian lingvon Esperanto, kia bonsona, riĉa, fleksebla kaj logike konstruita ĝi estas. Mi posedas neniajn alilandajn lingvojn, nur iomete komprenas germanan lingvon, sed neniam ku raĝus skribi aŭ eĉ respondi kelkajn vortojn germane, kvankam mi lernis ĝin ok jarojn, estante ginaziano; do la lingvon internacian Esperanto mi tuj ellernis en daŭro de du semajnoj, uzinte nur 1—2 horojn ĉiutage. Kune kun mi sukcese ellernis ĝin en tia sama tempo mia filino dekjara kaj ni ambaŭ komencis esperantan korespondadon kun rusaj kaj alilandaj geesperantistoj por esplori, ĉu oni komprenos nin. La rezultatoj estis mirindaj. Mi intence elektadis el la adresaro ĉiam novajn korespondantojn: francajn, garmanajn, anglajn, italajn, svedajn, norvegain, portugalajn kaj aliajn; ĉiuj ili tre bone komprenis miajn esperantajn leterojn kaj mi mem ne malpli bone komprenis iliajn. Tiamanierė mi korespondadis kun anoj de deksep diversaj nacioj, inter kiuj estis ankaŭ unu Arabo, sinjoro Ganouna el Afriko. Mi ne povis pli dubi,

по эсперантски и я самъ не менѣе хорошо ихъ. Такимъ образомъ я переписывался съ лицами семьнадцати разныхъ націй, между которыми былъ также одинъ арабъ, г. Гануна изъ Африки. Я не могъ болѣе сомнѣваться, что Эсперанто вполнѣ годенъ для корреспонденціи, какъ всякій живой языкъ.

ke Esperanto estas tute taŭga por la interkorespondado, kiel ĉiu natura lingvo.

До того я писалъ иностранцамъ, которые тоже изучили языкъ Эсперанто. Теперь я пожелалъ испытать, дѣйствительно-ли правда, какъ я читалъ въ эсперантскомъ учебникѣ, что даже лица, которые вовсе не учили его, также хорошо поймутъ всякое эсперантское письмо, если вы приложите къ вашему письму листокъ-корнесловъ съ эсперанто на соотвѣтствующій національный языкъ Я послалъ дѣловое письмо фирмѣ Н. D. Justi въ Филадельфію (Сѣв. Америка), приложивъ эсперантски-англійскій листокъ. Очень скоро (29 Сентября 1892 года) я получилъ отвѣтъ (написанный по нѣмецки). Цитирую изъ письма слѣдующія строки: „Вашъ объяснительный (?) листъ Эсперанто мы своевременно точно получили и съ его помощью съ легкостью могли перевести ваше открытое письмо. Вы можете намъ и впредь охотно писать на международномъ языкѣ“....

Ĉis tiam mi skribis al alilanduloj, kiuj ankaŭ ellernis la lingvon Esperanto. Nun mi volis esplori, ĉu efektive estas vere, kiel mi legis en esperanta lernolibro, ke eĉ personoj, kiuj tute ne lernis ĝin, ankaŭ bone komprenos ĉian esperantan leteron, se vi almetos al via letero folieton—radikvortaron en la lingvo esperanta —nacia konvena. Mi sendis komercan leteron al la firmo H. D. Justi en Philadelphia (Norda Ameriko), almetinte esperanta-anglan folieton. Tre baldaŭ (29 septembro 1892 jaro) mi ricevis respondon (germane skribitan). Mi citas el la letero jenajn liniojn: „Ihr Instructions Blatt „Esperanto“ haben wir seiner Zeit richtig empfangen und mit Hülfe desselben Ihre Karte mit Leichtigkeit übersetzen können. Sie können uns auch fernerhin gern in der internacionalen Sprache schreiben“...

Еще одинъ разъ я послалъ эсперантское письмо торговому дому „Братья Гезель въ Берлинѣ“. Вотъ что между прочимъ они мнѣ отвѣтили: „Ваше письмо на Эсперанто мы поняли безъ труда и должны признать языкъ идеальнымъ, который можно понять безъ необходимости изучать его. Было бы весьма желательно, чтобы такое драгоцѣнное новшество вошло во всеобщее употребленіе. Наши дѣти очень много трудятся въ школахъ, чтобы изучить латинскій, англійскій и французскій языки, безъ того, чтобы за эти труды достигнуть большихъ результатовъ. Эсперанто могъ бы изучить каждый ребенокъ въ нѣсколько недѣль.

Ankoraŭ unu fojon mi sendis esperantan leteron al komerca firmo „Gebrüder Gesell en Berlin, Oranienburgerstrasse 21. Jen kion interalie oni respondis al mi:“ Ihren Brief in Esperanto haben wir ohne Mühe verstanden, und müssen allerdings eine Sprache für ideal erklären, welche verstanden werden kann, ohne dass man nöthig gehabt hätte sie zu erlernen. Es wäre sehr zu wünschen, dass eine so wertvolle Neüerung allgemeine Einführung fände. Unsere Kinder quällen sich in den Schulen sehr ab Latein, Englisch und Französisch zu lernen, ohne dass man viele Frucht diesen Mühe ersehen kann. Esperanto würde von jedem Kinde in wenigen Wochen erlernt werden“.

Чтобъ помочь распространенію Эсперанто я отпечаталъ множество листковъ о языкѣ и его свойствахъ, разсылалъ ихъ многимъ, пріобрѣлъ много учебниковъ, которые я частью раздавалъ безплатно, частью продавалъ, чтобы возможно больше познакомить людей съ этимъ прекраснымъ язы-

Por helpi la disvastigadon de Esperanto mi presis multegon da anoncoj pri la lingvo kaj ĝiaj ecoj, dissendadis ilin kaj disdonadis al multaj homoj, aĉetis multajn lernolibrojn, kiujn mi parte disdonadis senpage, parte vendadis, por kiom eble pli vaste konatigi la homojn kun tiu ĉi bela lingvo. El multaj leteroj

комъ. Изъ многихъ писемъ отъ лицъ, заинтересовавшихся Эсперанто, я позволю себѣ цитировать только нѣкоторыя.

Какой-то господинъ пишетъ мнѣ 14-го Сентября 1893 года: „Услышавъ лестные отзывы о новомъ языкѣ Эсперанто, я очень желалъ-бы поближе познакомиться съ нимъ и потому покорнѣйше прошу Васъ выслать мнѣ два учебника Эсперанто по адресу: Тамбовъ, д. Алмазова для меня. Съ истиннымъ почтенiемъ вашъ покорный слуга А. Рихтеръ."

Я исполнилъ просьбу и выслалъ ему просимыя двѣ книжки. Уже 26 Сентября онъ пишетъ мнѣ по эсперантски слѣдующее письмо:

„М. Г. Языкъ Эсперанто мнѣ очень нравится. Я знаю немного иностранные языки и потому для меня почти не составляетъ никакого труда понимать языкъ Эсперанто. Я читаю безъ словаря, но пишу со словаремъ. Я никакъ не ожидалъ, чтобъ этотъ языкъ былъ такъ легокъ, красивъ и такъ благозвученъ. Прошу васъ покорнѣйше объяснить мнѣ, какъ нужно читать букву L? Такъ мягко, какъ нѣмецкое L или твердо? Какой порядокъ словъ? Мой адресъ....

Вашъ покорный слуга А. Рихтеръ."

Если я скажу, что покрайней мѣрѣ десять дней необходимо было (отъ 14 Сент.), пока онъ получилъ отъ меня учебникъ, то мы увидимъ, что это письмо, въ которомъ только нѣсколько маловажныхъ ошибокъ (мы намѣренно не исправили ихъ), г. Рихтеръ написалъ уже на второй день послѣ полученiя книги.

Второе письмо. „Уважаемый докторъ! Послѣ вчерашняго нашего разговора я купилъ книгу Эсперанто. Прочитавъ внимательно всю книгу, я согласенъ съ вами, что международный языкъ очень красивъ и полезенъ. Я выражаю вамъ большую благодарность за знакомство съ Эсперанто.

Остаюсь съ глубокимъ почтенiемъ

Ив. Микеладзе."

Наканунѣ г. Микеладзе (адвокатъ въ Ялтѣ) очень спорилъ со мной и казался большимъ противникомъ искусственнаго языка.

Третье письмо, француженки, живущей въ Ялтѣ, которую я просилъ отмѣчать,

de la personoj, kiuj ekinteresiĝis pri Esperanto, mi permesos al mi citi nur kelkajn.

Ia Sinjoro skribas al mi 14an da septembro 1893-an jaron: „Aŭdinte laŭdajn opiniojn pri nova lingvo Esperanto, mi tre dezirus ekkoni ĝin pli bone kaj tial mi plej humile petas Vin elsendi al mi du libretojn „Esperanto" laŭ adreso: Tambov, domo de Almazov por mi, kun vera respekto via humila servanto A. Richter".

Mi plenumis la peton kaj sendis al li du petitajn libretojn. Jam la 26 da septembro li skribas al mi jenan esperantan leteron:

„Multestimata Sinjoro! La lingvo Esperanto al mi tre plaĉas. Mi scias malmulte alilandajn lingvojn kaj tial legi la lingvon Esperanto al mi estas preskaŭ nenian malfacilon. Mi legas sen vortaro sed skribas de la vortaro. Mi neniel atendis por ke tiu ĉi lingvo estis tiom facila, bela kaj tre bonsona. Mi petas Vin plej humile disklari al mi, kiel estis legi la literon l ? Tiel mole, kiel la Germanaj l, aŭ malmole? Kia estos ordo de la vortoj. Mia adreso...

Via humila servanto A. Richter."

Se mi diros, ke almenaŭ dek tagoj estis bezonaj ĝis li ricevis de mi la lernolibron (de 14-a sept.), ni vidos, ke tiun ĉi leteron, enhavantan nur kelkan negravajn erarojn (mi ilin intence ne korektis), sinjoro Richter jam skribis je l'dua tago post la ricevo de la libbreto.

Dua letero. „Estimata doktoro! Post hieraŭ nia parolo mi aĉetis libron d'Esperanto. Leginta atente ĉion libron mi konsentas kun vi, ke lingvo internacia estas tre bela kaj utila. Mi esprimas grandan dankon al vi por konatigo kun Esperanto.

Mi restas kun alta estimo

Iv. Mikeladze.

Je l'antaŭtago s-ro Mikeladze (advokato en Jalta) multe disputadis kun mi kaj ŝajnis granda kontraŭlo de artefarita lingvo.

Tria letero, skribita de unu francino, loĝanta en Jalta, kiun mi petis noti, kiom da horoj ŝi

сколько часовъ ей понадобится для изученія языка. Кромѣ своего родного языка, она говоритъ еще только по русски.

„М. Г. (Сегодня двѣнадцатый часъ, что я изучаю языкъ Эсперанто) Я видѣла копію картины Рафаэля — „Пожаръ въ Ватиканѣ". Огонь уже не былъ неистовымъ: уничтоживъ жилища бѣдняковъ, пламя уже достигало мраморныхъ колоннъ Ватикана. Сколько сценъ отражалось при заревѣ этого огня! Впереди виденъ юноша, который несетъ очень стараго мужа съ такой нѣжностью, что всякій можетъ догадаться, что этотъ юноша несетъ своего отца. Съ правой стороны картины видна, бѣгущая изъ еще пылающаго дворца, величественная женщина, вся украшенная алмазомъ и жемчугомъ, прекрасно одѣтая, со слезами на глазахъ. Она держитъ за руки двухъ маленькихъ дѣтей почти нагихъ. Старшая, нѣжная дѣвочка прикрываетъ себя плащемъ своей матери. Между этими сценами масса людей: старики, дѣти, солдаты, священники, богатые, бѣдные, всѣ бѣгущіе туда и сюда по площади „Святого Петра". Влѣво, близко отъ дворца Ватикана, видно, какъ четыре солдата несутъ на мечахъ, образующихъ крестъ, молодую безжизненную дѣвушку. Блескъ огня отражается на лицѣ ея и на прозрачномъ лбу. Какъ она прекрасна! Напротивъ, у пылающаго окна дворца Ватикана стоитъ Пресвятѣйшій Папа. Его крестъ блеститъ сквозь пламень. Онъ молится. Нѣсколько людей простираютъ руки къ небу въ знакъ молитвы. Когда я внимательно смотрѣла на эти сцены, соединенныя въ одну картину, мнѣ казалось, что я одновременно слышу и ужасный ураганъ и шопотъ молитвы. О, какъ прекрасна картина, о которой я Вамъ разсказываю.

E. Goulon„.

Гг. Mikeladze и E. Goulon тоже сдѣлали нѣсколько незначительныхъ ошибокъ. Но возможно ли на какомъ угодно живомъ языкѣ описать такъ поэтически картину всего лишь послѣ двѣнадцати часовъ изученія этого языка?

Точно также удивительно легко и разговаривать на яз. Эсперанто. Всякій, кто только теоретически изучилъ языкъ, можетъ уже послѣ двухъ — трехъ часовъ практики разговаривать довольно хорошо и быстро. Въ эсперантскихъ газетахъ можно очень

bezonos por ellerni la lingvon. Krom sian patrolingvon, ŝi parolas nur ruse.

„Sinjoro! (Hodiaŭ estas la 12-a horo, ke mi lernas la lingvon Esperanto). Mi vidis pentraĵon laŭ Rafaelo — „Fajro apud Vatikano". Jam fajro ne estas pli furioza, konsuminta la domojn de la mizeruloj, la flamo jam atingas la marmorajn kolonojn de la Vatikano. Kiom scenoj brilis en la heleco de tiu ĉi fajro! Antaŭe oni vidas unu junulon, kiu portas tre maljunan viron kun tiom da dolĉeco, ke ĉiu tuj povas diveni, ke tiu-ĉi junulo portas sian patron. Dekstre de la pentraĵo oni vidas kurantan el unu palaco ankoraŭ brulanta unu majestan virinon, tute ornamita per diamantoj kaj perloj, vestita belege, sed kun larmoj en la okuloj. Ŝi tenas la manojn de du junaj infanoj preskaŭ nudaj. La pli maljuna, ĝentila knabino vualas sian korpon kun la mantelo de sia patrino. Inter tiuj ĉi scenoj estas amasoj da homoj: maljunuloj, infanoj, soldatoj, pastroj, riĉaj, malriĉaj ĉiuj kurantaj ĉie kaj tie tra la placo „Sankta Petro". Maldekstre en proksima loko de la palaco „Vatikano", oni vidas junan fraŭlinon senviva, portata per kvar soldatoj, kuŝita sur glavoj, formante krucon. La heleco de la fajro rebrilas sur ŝia vizaĝo kaj diafana frunto. Kiel ŝi estas bela! Kontraŭe staras apud unu brulanta fenestro de la palaco Vatikano Lia Papa Moŝto. Lia kruco brilas tra la flamo. Li preĝas. Kelkaj homoj etendas la manojn al la ĉielo, kiel signo de preĝo. Kiam mi atente rigardis tiujn scenojn, unuigitaj en unu pentraĵo, ŝajnas al mi aŭdi la teruran uraganon kaj samtempe la murmuron de la preĝo. Oh, kiel estas bela la pentraĵo, pri kiu mi parolas al Vi!

E. Goulon.

Gesinjoroj Mikelaladze kaj Goulon ankaŭ faris kelkajn negravajn erarojn. Sed, ĉu estus eble en ia natura lingvo tiel poezie priskribi pentraĵon post nur dekdu hora lernado de tiu lingvo?

Tiel same estas mirinde facila la interprolado en Esperanto. Ĉiu, kiu nur teorie ellernis la lingvon, povas, post nur du aŭ tri hora praktikado, paroladi jam sufiĉe bone kaj rapide. En esperantaj gazetoj oni povas tre ofte legi pri renkontoj de alilanduloj, ne konantaj naturan

часто прочесть про встрѣчи иностранцевъ, не владѣющихъ общимъ живымъ языкомъ, которые, однако, совершенно свободно разговариваютъ на яз. Эсперанто.

Лично я также дважды имѣлъ случай разговаривать со шведомъ и англичаниномъ съ удивительнымъ успѣхомъ.

Несмотря на мою большую и частую переписку на яз. Эсперанто, я все-же продолжалъ сомнѣваться въ годности его для устной рѣчи. Чтобъ испытать это, я пригласилъ къ себѣ шведскаго эсперантиста, студента Упсальскаго университета г. V. Langlet который любезно принялъ мое приглашеніе и пріѣхалъ ко мнѣ въ 1895 году. Несмотря на то, что мы оба владѣли лишь нашими отечественными языками, мы втеченіи почти трехъ недѣль, живя вмѣстѣ, разговаривали всегда очень много на разныя темы съ удивительной легкостью и удобствомъ на международномъ языкѣ.

Авторитетныя мнѣнія объ Эсперанто и благосклонное отношеніе къ нему знаменитѣйшихъ филологовъ и другихъ ученыхъ, а также и очевидныя достоинства Эсперанто, которыя мы эсперантисты узнали, употребляя его практически письменно и устно, не оставляютъ никакого сомнѣнія въ полнѣйшей пригодности и громадномъ значеніи Эсперанто для человѣчества.

Докторъ И. Островскій.

komunan lingvon, kiuj tamen tute libere interparoladas en Esperanto.

Persone mi ankaŭ dufoje havis okazojn paroladi kun Svedo kaj Anglo kun mirinda sukceso.

Malgraŭ mia multa kaj ofta korespondado en Esperanto kun granda sukceso, mi tamen daŭris dubi, ĉu ĝi taŭgas por buŝa parolado. Mi timis, ke diversaj naciuloj malegale elparolos ĝin. Por esplori tion-ĉi mi invitis ĉe mi unu svedan esperantiston, studenton el Upsala universitato, sinjoron V. Langlet, kiu afable akceptis mian inviton kaj alveturis al mi Jalton en 1895 jaro. Malgraŭ tio, ke ni ambaŭ konis nur niajn patrujajn lingvojn, ni en daŭro de preskaŭ tri semajnoj, loĝante kune, paroladis ĉiam tre multe pri ĉiuj ajn objektoj kun mirinda facileco kaj oportuneco en internacia lingvo.

La aŭtoritataj opinioj pri Esperanto kaj la favora rilato al ĝi de plej eminentaj filologistoj kaj de aliaj scienculoj, ankaŭ la okulvideblaj indoj de lingvo Esperanto, kiujn ni esperantistoj ekkonis, uzante ĝin praktike skribe kaj buŝe, forigas ĉiujn dubojn pri plena taŭgo kaj grandega signifo de Esperanto por la homaro.

Doktoro I. Ostrovski.

## Маленькое письмо стараго эсперантиста.

Вышелъ первый нумеръ эсперантской газеты въ Россіи.

Это — цѣлое событіе въ жизни нашего дѣла, и событіе громадной важности.

Россія была колыбелью эсперантизма: въ ней нашъ дорогой языкъ родился и въ ней нашелъ онъ своихъ первыхъ горячихъ друзей.

Друзья нашего дѣла, присоединившіеся къ нему въ первые годы его возникновенія, когда не было ни обществъ, ни газетъ, ни книгъ (кромѣ учебниковъ), но за то лучезарно сіяла основная великая цѣль—содѣйствовать духовному сближенію народовъ съ

## Malgranda letero de malnova esperantisto.

Aperis la unua numero de esperanta gazeto en Ruslando.

Tio ĉi estas vera fariĝo en la vivo de nia afero, fariĝo kun grandega graveco.

Ruslando estis la lulilo de l'esperantismo: en ĝi nia kara lingvo naskiĝis kaj en ĝi trovis ĝi siajn unuajn fervorajn amikojn.

La amikoj de nia afero, aliĝintaj al ĝi en la unuaj jaroj post ĝia ekapero, kiam ekzistis nek societoj, nek gazetoj, nek libroj (krom lernolibroj), sed anstataŭe lumradie briladis la fundamenta granda celo — helpi al la spirita kunproksimiĝo de l'popoloj en unu familion,

одну семью,—сохраняютъ объ этихъ первыхъ годахъ самыя задушевныя, самыя трогательныя воспоминанія.

Для тѣхъ изъ насъ, кто въ то время былъ еще молодъ, эсперантизмъ явился точно молодая пурпуроперстая Эосъ, которая украсила утро нашей жизни прекраснѣйшимъ свѣтомъ. Эсперантизмъ былъ тѣмъ дѣломъ, въ которомъ находили для себя выраженіе и примѣненіе найлучшія идеалистическія стремленія, томящія душу и ищущія себѣ выхода наружу. Всѣ прекраснѣйшія стороны души человѣческой приведены были въ дѣйствіе. Сколько благороднѣйшихъ біеній человѣческаго сердца было вызвано этимъ дѣломъ!

Благодаря эсперантизму, люди, носящіе въ душахъ своихъ одинаковыя стремленія, влекомые одними и тѣми-же порывами, узнавали другъ про друга и, почуствовавъ что они не одни въ мірѣ со своими идеалами, не падали духомъ, а напротивъ, укрѣплялись въ вѣрѣ въ людей и добро.

Развѣ все это не представляетъ уже само по себѣ великаго и благого дѣла?

Каждый эсперантистъ, поработавшій искренно и самоотверженно для эсперантскаго дѣла хотя очень немного времени, не можетъ не признать, положивъ руку на сердце, что это было самое хорошее и святое время его жизни, которое оставило свои благодѣтельныя послѣдствія и на послѣдующіе дни жизни его, въ смыслѣ самого благотворнаго воздѣйствія на его душу.

Вотъ почему эсперантисты вмѣстѣ съ любовью къ эсперантскому дѣлу питаютъ также и чувство самой искренней благодарности къ нему.

Теперь дѣло обстоитъ совершенно иначе, чѣмъ 18 лѣтъ тому назадъ: свои газеты, мы считаемъ уже десятками, свои общества и свои книги—сотнями названій, въ рядахъ лицъ, сочуствующихъ намъ, имѣемъ выдающихся писателей, ученыхъ, государственныхъ дѣятелей; дѣло пріобрѣло себѣ во всемъ мірѣ какъ-бы право гражданства.

Теперь мы можемъ работать уже при гораздо болѣе облегченныхъ условіяхъ.

Новая газета является тоже новымъ могущественнымъ подтвержденіемъ жизненности нашего дѣла. Она сдѣлается, конечно, средствомъ для сближенія между собою многихъ эсперантистовъ.

—konservas pri tiuj ĉi unuaj jaroj plej enanimajn, plej kortuŝemajn rememorojn.

Por tiuj el ni, kiu estis tiam ankoraŭ juna, l'esperantismo aperis kvazaŭ juna ruĝetfingra Eos, kiu ornamis la matenon de nia vivo per plej bela lumo. L'esperantismo estis tia afero, en kiu trovis por si esprimon kaj uzon la plej bonaj idealaj celadoj, turmentantaj l'animon kaj serĉantaj por l'eksteriĝon. Ĉiuj plej altaj flankoj de l'homa animo estis agigitaj. Kiom da plej noblaj batoj de l'homa koro estis ekscititaj per tiu ĉi afero!

Dank'al l'esperantismo homoj, portantaj en siaj animoj egalajn celadojn, tirataj de samaj deziregoj, ekkonadis unu la alian, kaj eksentinte, ke ili ne estas solaj en la mondo kun siaj idealoj, ne perdadis energion, sed, kontraŭe, ili plifortiĝadis en kredo je la homoj kaj je la bono.

Ĉu tio ĉi ne prezentas jam per si mem grandan kaj bonan aferon?

Ĉiu esperantisto, laborinta sincere kaj memofereme por la esperanta afero eĉ tre malmulte da tempo, ne povas malkonfesi, metinte la manon sur la koron, ke tio ĉi estis la plej bona kaj sankta tempo de lia vivo, kiu lasis siajn bonfarajn postsignojn ankaŭ por la postaj tagoj de lia vivo, noblege efikinte je lia animo.

Jen kial la esperantistoj kune kun la amo al esperanta afero havas ankaŭ la senton de plej sincera danko al ĝi.

Nun la afero staras tute alie ol antaŭ 18 jaroj: niajn gazetojn ni kalkulas po dekoj, niajn societojn kaj niajn librojn po centoj da nomoj, en la vicoj de personoj, favorantaj al ni, ni havas eminentajn verkistojn, scienculojn, regnajn agantojn; la afero akiris en la tuta mondo kvazaŭ „rajton de regnaneco".

Nun ni povas labori ĉe multe pli faciligitaj kondiĉoj.

La nova gazeto ankaŭ ree potence ripetas pri la viveco de nia afero. Ĝi fariĝos, sendube, ilo por interproksimiĝo de multaj esperantistoj.

Намъ нужно только не забывать. никогда не забывать основной великой цѣли нашей— содѣйствовать духовному сближенію народовъ въ одну семью, дабы умножилась въ мірѣ любовь и истина Какъ солнце отражается въ ничтожной каплѣ воды, такъ наша великая цѣль должна отражаться въ каждомъ, даже самомъ маломъ дѣлѣ нашемъ, предпринимаемомъ для достиженія этой цѣли. Во всеоружіи любви и правды бодро примемся мы за усиленную работу и станемъ свѣтло и увѣренно смотрѣть въ будущее.

Уже многое сдѣлано и достигнуто. Будемъ работать еще и еще.

Да здраствуетъ человѣчество!

Да здраствуетъ братство народовъ!

Будемъ работать и надѣяться!

Сердечный привѣтъ близкимъ и далекимъ!

*Илья Пучковскій*

Петербургъ, Январь 1905.

